

Rio Esperantista



ASOCIO ESPERANTISTA
DE RIO-DE-JANEIRO

Decembro – februaro – 2012/13

Kultura Revueto

de

AERĴ

1. La espero.

Mova de gilla marlo. F de Maiz. L. L. Combrachi.

en - to, tra la ma - do i - ras for - la co - ri - to; per ri -
gi - to de fa - ti - la ven - to nun do - lo - ho ri - ga - ri al do - no No al
- glo - vo longvo do - i - tan - la - la ho - mo ti - ras fa - mi - li - an - ti - la
ma - t e - ter - so - ni - ti tan - to (ti pro - ma - me nunto her - to - al - os.
tar - ma - her - o - da - ti vi - do.

Fin al B. h. trino. Sop.

Al tempo

Mendu por printo al AERĴ

OFICIALA ORGANO DE ASOCIO ESPERANTISTA DE RIO-DE-JANEJRO

Decembro – Februaro – 2012/13

ASSOCIAÇÃO ESPERANTISTA DO RIO DE JANEIRO

★ Rua Teófilo Otoni, 135 / 302 ★

☎ 2467-4296 – ✉ aerjrj@hotmail.com e www.aerj.org.br

Redaktas: *Paulo Sérgio Viana*

Arangas: *Alfredo Araújo*

RIO ESPERANTISTA RENASKIĜAS

La nova estraro de Asocio Esperantista de Rio-de-Janejro decidis revivigi sian plurjardeke tradician bultenon “Rio Esperantista”. Jen laŭdinda iniciato, kiu meritas ĉies apogon.

Post la regula starigo de siaj kulturkunvenoj en la sidejo, en la centra kvartalo de Rio kaj paralele al la regula aŭspiciado de la renkontoj de Esperantistoj tra la ŝtato, jen renaskiĝas nia ŝatata bulteno.

Ni esperas, ke la membroj de la asocio apogu tiun valoran decidon de la estraro. Tio oni povas fari per legado kaj sendado de opinioj, konstruaj kri-

tikoj, proponoj kaj kontribuoj per kultura materialo. – *P.S.V.*

Kun la espero daŭre prezenti ĉi-tiun bulteneton, plena de originalaj kaj tradukitaj kontribuoj de niaj legantoj, por pligrandigi la buntan kreivon de niaj samlandanoj.

Ni ankaŭ bezonas vian helpon kaj komprenon por ke ni fariĝu veraj reprezentantoj de nia ŝtato antaŭ la brazila esperantistaro, manifestiĝu vi esperantistoj, lokitaj proksime kaj malproksime.

Ni kiel vivanta Asocio havas elspezojn; fariĝu ano de la Asocio. – *A.A.*



Aloisio Sartorato

La homo kiu nomiĝas Espeanto:

Iam, en la okdekaj jaroj, mi konis homon, kiu nomiĝas “Esperanto”.

Mi estis parkumanta mian aŭtomobilon kaj tiam mi perceptis, ke iu taksio haltis proksime de mia veturilo. El ĝi eliris la ŝoforo, kiu sindirektis al mi. Estis vintre kaj la loko estis iom malluma. Mi timis, sed la homo tuj trankviligis min, dirante, ke li ne estas rabisto.

Kaj li tuj demandis al mi:

- Ĉu vi nomiĝas Esperanto?

Kaj mi kompreneble respondis:

-Tute ne!!! Mi estas instruisto de Esperanto! Kial vi demandas tion al mi?

Kaj li respondis:

- Ĉar mi mem nomigas Esperanto!

- Ĉu veere???, mi demandis.

Kaj li prenis sian identigilon kaj montris al mi. Kaj tie estis skribite:

Esperanto Noblat Jr., filo de Esperanto Noblat.

Mi demandis:

- Ĉu vi estas esperantisto?

Kaj la homo respondis:

- Ne! (Fakte li estis simpla homo kaj tutcerte ne interesiĝis pri lernado de lingvoj).

- Sed kial vi nomiĝas Esperanto? mi demandis. Kaj li aldonis:

- Mia avo elektis tiun nomon por mia patro kaj li ŝatis ĝin kaj ankaŭ nomis min Esperanto. Mi decidis alparoli vin, ĉar mi vidis sur la malantaŭa glaco de via aŭtomobilo tiun gluafişon ESPERANTO – LINGVO INTERNACIA, kaj pro tio mi pensis, ke vi ankaŭ nomiĝas Esperanto.

Do jen tiu estis la tago, kiam mi konis homon, kiu fakte nomiĝas “Esperanto”.

(El la verko “Saluton, Samideano!”)

Aloisio Sartorato estas fervora Esperantoaktivulo, kiu de jardekoj laboradas por nia movado en Rio. Li estis kunfondanto/estrarano de Brazila Esperantista Junulara Organizo; de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, de Brazila Esperanto-Ligo kaj de Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro. Li verkis la sukcesan lernolibron “ Esperanto para Principiantes” kaj jam publikigis plurajn tradukitajn kaj originalajn beletraĵojn.

RECENZO

NEFORGESEBLAJ SKRIBAĴOJ DE ISMAEL GOMES BRAGA

Eldono Brazila Esperanto-Ligo – 2012, 318 paĝoj

Organizis: Eurípedes A. Barbosa, Aymoré V. Pinto, Sandro M. Alves



Paulo Sérgio Viana

Ĝojigan novaĵon ricevis en ĉi tiu jaro 2012 la brazila Esperantistaro. Kaj mi kuraĝas aserti, ke eĉ la eksterbrazila samideanaro havas motivojn por ĝojo. Brazila Esperanto-Ligo eldonis veran juvelon en formo de libro. Per plaĉaj bindo kaj karton-kovrilo (kie aperas manskribaĵoj de la omaĝato), kaj per klara grandlitera preso, jen aperas antaŭ la publiko riĉenhava volumo kun tekstoj de tiu, kiu estis unu el la plej aktivaj kaj gravaj pioniroj de la brazila Esperantomovado: Ismael Gomes Braga. Poligloto, vortaristo, tradukisto, didaktikisto, kontoristo kaj precipe eminenta stilisto kaj profunda konanto de la lingvo Esperanto, li grave influis la progresadon de nia movado en Brazilo, en tempo, kiam ĝi baraktis en stagnado kaj malvigleco. Meze de la pasinta jarcento, kun sia prestiĝo ene de la spiritisma movado, li uzis ties strukturon favore al disvastigado de la lingvo. Ĝis nun oni rikoltas la fruktojn de lia laboro. Li kunfondis Kulturaran Kooperativon de Esperantistoj, en Rio, kun ambicia laborprogramo, kaj

estas la aŭtoro de la unua originala literatura libro eldonita en Esperanto, en Brazilo: la leginda “Veterano?”. Inter multaj aliaj verkoj, elstaras lia “Kurso de Esperanto per la Biblio”. Kaj li abunde verkis por revuoj.

La nun recenzata volumo estas rezulto de pacienca, fervora serĉado de liaj tekstoj aperintaj en la gazetaro. La organizintoj faris kompetentan laboron, ĉar la kolekto estas vere altvalora kaj meritas atentan tralegadon, eĉ studadon. Ili sukcesis kolekti 92 recenzojn, 10 leterojn kaj 39 artikolojn. La tuto finiĝas per kromaj 5 tekstoj de aliaj aŭtoroj, kiuj omaĝas lin. Krom la beleco de lia klasika, pura stilo, oni havas per ĉi tiu libro la okazon ekkoni la homon Ismael. Li estis ĝisfundulo, klera kaj tamen senpretenda, ĉiam delikata kaj bonkora en siaj komentoj, eĉ kiam li devis malaprobi ion. Kortuŝas konstati, ke li posedis senliman, neelĉerpeblan amon al Esperanto kaj firman kredon pri ĝia venko. Jen ekzemplo: – “*Ĉu niaj laboriloj estas ĉiuj pretaj? Ne; oni devas ĉiam plibonigi*

unujn kaj krei aliajn. Ni ne rigardu malantaŭen, ĉar nia granda kaj glora laboro estas en la estonteco. Ni preparu tutan armeon da junaj instruistoj en la gimnazioj kaj normaj lernejoj, en liceoj kaj fakultatoj. Porinfana literaturo kresku senĉese tra la mondo.” (pĝ. 273) Ankoraŭ aktualaj vortoj, ĉu ne?

Kroma valoro de ĉi tiu kolekto estas la trafa maniero kiel Ismael G. Braga redaktis siajn recenzojn. Ĉiam tre ekvilibre, prudente kaj erudicie, li montris la ĉefajn trajtojn de la konsiderata verko, laŭdante laŭdindaĵojn kaj kritikante kritikindaĵojn.

Tamen, ĉi tiujn lastajn li tre delikate kaj prudente kritikis, neniam de true aŭ malapreze. Li ofte elstarigis la gravecon de la Esperanta literaturo por la evoluo de la lingvo.

La libro estas ĉiel laŭdinda kaj leginda. Ni tamen diru, ke granda kvanto da preseraroj enŝteliĝis tra la tuta volumo, pro manko de lasta atenta revizio. Ili tute ne malhelpas la legadon kaj ĝuadon de la verko, sed la perlo meritas elsarkadon de tia armeo da koboldoj, en proksima eldono. Ni kore gratulas Brazilan Esperanto-Ligon pro tiu gemo.



Malkovro

*Al Carlos Drumon de Andrade
Maria Nazaré Larocca*

Tiel kiel mildas ĉio senpaga
Subite akvo
Ekloĝis en roko,
Ŝirmejo plenreva
De Longe solgrave. De
En la brusto de ĉiu ŝtono
Neatendita rozpetalo:
Tute ĉiutaga mistero.

NIJA PAROLIGAJ KUNSIDOJ

En ĉiu Esperantorondo oni okazigas kursojn por komencantoj. Kelkaj obstinuloj finas la kurson. Sekve, oni devas paroligi kaj progresigi ilin. Tiu-cele, oni starigas konversaciajn rondojn, kiuj devas esti amuzaj, interesaj

kaj efikaj, tiel ke ili stimulu spontanegan konversacion en gaja etoso. Kaj preferi ili ne estu tro infanecaj, se temas pri ĉeestantaj plenkreskuloj. Fine, estas tre dezirinde, ke ili estu ankaŭ klerigaj kaj inteligentaj. En ĉi tiu rubriko de nia bulteno, ni invitas la samideanojn sendi al ni siajn ideojn kaj spertojn pri la plej taŭga maniero “malkrokodiligi” la novajn (kaj ankaŭ la “eternajn”) komencantojn. Ĉi-sube mi aperigas unu tian ekzercon, uzatan en la kunsidoj de Lorena Esperanto-Klubo, en ŝtato San-Paŭlo:

1. Mi naskiĝis en Germanujo. Mia granda pasio estis muziko. Mi komponis multajn muzikaĵojn, sed plej famaj estas miaj naŭ simfonioj. Mia lasta simfonio finiĝas per vigla, gaja kanto honore al ĝojo. Tamen, mi mem multe suferis dum

mia vivo, ĉar iom post iom mi fariĝis surda. Multajn miajn muzikajn verkojn mi mem ne povis pro tio aŭskulti. Mia nomo estas: _____

2. Mi naskiĝis en Francujo, kaj dum mia vivo la popolo tre amis min, pro tio ke mi defendis la rajtojn de malriĉaj homoj. Mi estis speco de “romantika socialisto”. Mi verkis multajn poemojn kaj romanojn, ĉiam kun granda homamo. La temo de mia plej fama libro estas precize la suferado de mizeraj homoj en la kruela, egoisma socio. Mia nomo estas: _____

3. Mi naskiĝis en vilaĝo proksima al Florenco, en Italujo, en Mezepoko. Mi estis tre scivolema, mi interesiĝis pri botaniko, anatomio, inĝenierarto, pentrarto, skulptarto, filozofio, kaj

aliaj sciencoj. Mi inventis multajn aparatojn kaj pentris kelkajn bildojn, kiuj famiĝis. Mia plej fama pentraĵo montras sinjorinon, kiu laŭdire mistere ridetas. Mia nomo estas: _____

4. Ankaŭ mi naskiĝis en Mezepoko, sed en Anglujo. Mi estis poeto sed mi plej amis teatron, kaj mi eĉ konstruigis teatrejon en mia urbo, kiu nomiĝis “La Terglobo”. En tiu teatrejo oni prezentis multajn dramojn, kiujn mi mem verkis. Unu el ili, la plej fama, temas pri severa princo, kies patro aperis al mi kiel fantomo, postulante venĝon. Mia nomo estas: _____



NIA KVIZO

Unu naiva kritiko, kiun oni ankoraŭ faras en pseŭdoklerulaj rondoj estas tiu, ke Esperanto ne havas kulturon, kaj ke lingvo sen kulturo ne estas propre lingvo. Por ni, Esperantistoj, tia kritiko sonas preskaŭ ridinde, ĉar ni scias, ke ni vivas en mondeto kulturplena. Ni havas nian prozon, nian poezion, niajn komunumojn, niajn “denaskulojn”, niajn kongresojn kaj renkontojn, niajn prelegojn, piknikojn kaj promenojn, eĉ niajn ŝercojn kaj kverelojn. Kaj ni mirinde viglas

ankaŭ en interreto. Ni ja estas vivanta, homeca mondo!

Tamen... ĉu ni estas pretaj por konvinke respondi al tia senfundamenta kritiko al Esperanto? Kaj precipe: ĉu ni efektive partoprenas kaj kontribuas por nia kulturo? La plej bona respondo estas klare montri, kiom la uzado de Esperanto helpas nin formi pli riĉan komprenon pri nia mondo. Ĉu vi povas tion senhezite aserti pri vi mem?

La ĉi supra kvizo celas instigi vin pensi pri la jena demando: kiagrade vi konscias kaj profitas el la Esperanta kulturo? Por tio, bonvolu respondi la jenajn demandojn:

1. Kiu tradukis al Esperanto la romanon “*Quo vadis?*”?

- a) Lazaro Zamenhof
- b) Lidja Zamenhof
- c) Felikso Zamenhof

2. En kiu urbo situas la sidejo de Universala Esperanto-Asocio?

- a) Roterdamo
- b) Parizo
- c) Londono

3. Kion signifas la ĵargonajo “*krokodili*”?

a) paroli en Esperanto en neesperantista medio.

b) paroli per la lingvo de mansignoj

c) paroli nacilingve en Esperantista medio

4. En kiuj landoj okazos la Universallaj Kongresoj de Esperanto en la jaroj 2013 kaj 2014?

- a) Islando kaj Argentino
- b) Argentino kaj Irlando
- c) Ĉilio kaj Islando

5. “*Brasiko*” estas nomo de

- A) frukto
- b) besto
- c) verda folio



NIAJ KLASIKULOJ

Unu el la plej gravaj servoj de Esperanto estas kiel pontolingvo inter diversaj kulturoj. En Esperanto eblas legi ĉefverkojn de popoloj el la tuta mondo. Tial estas grave, ke Esperantistoj proponu al alilandaj samideanoj la plej gravajn verkojn de sia propra lando, tradukitajn en nian komunan lingvon. Sed arta traduko ne estas facila afero. Oni devas multe ekzerciĝadi kaj legadi la tekstojn de talentaj tradukistoj por lerni de ili tian arton. Ĉi tie ni prezentas ekzemplon. La leganto multon lernos, se li komparos kun la originalo la Esperantan tradukon de la fama rakonto de la brazila famulo João Guimarães Rosa – “*A hora e a vez de Augusto Matraga*”. La tradukon faris Leopoldo H. Knoedt, la verkon publikigis eldonejo “*Fonto*”, en 1997:

A hora e a vez de Augusto Matraga

Matraga não é Matraga, não é nada. Matraga é Estêves. Augusto Estêves, filho do Coronel Afonso Estêves, das Pindaibas e do Saco-da-Embira. Ou Nhô Augusto – o homem – nessa noitinha de novena, num leilão de atrás da igreja, no arraial da Virgem

La horo kaj la vico de Aŭgusto Matraga

Matraga ne estas Matraga, li estas nenio. Matraga estas Esteves. Aŭgusto Esteves, filo de Kolonelo Alfonso Esteves, Pindaibas kaj de Sako-de-Lianoj. Aŭ ĉjo Aŭgusto – la viro – en tiu novena vespero, dum aŭkcio

Nossa Senhora das Dores do Córrego do Murici.

Procissão entrou, reza acabou. E o leilão andou depressa e se extinguiu, sem graça, porque a gente direita foi saindo embora, quase toda de uma vez.

Mas o leiloeiro ficara na barraca, comendo amêndoas de cartucho e pigarreando de ronco, bloqueado por uma multidão encachaçada de fim de festa.

E, na primeira fila, apertadas contra o balcãozinho, bem iluminadas pelas candeias de meia-laranja, as duas mulheres-à-toa estavam achando em tudo um espírito enorme, porque eram só duas e pois muito disputadas, todo-o-mundo com elas querendo ficar.

Beleza não tinham: Angélica era preta e mais ou menos capenga, e só a outra servia. Mas, perto, encostado nela outra, um capiau de cara romântica subia todo no semjeito; eles estavam se gostando, e, por isso, aquele povo encapetado não tinha – pelo menos para o pobre namorado – nenhuma razão de existir. E a cada momento as coisas para ele pioravam, com o pessoal aos gritos:

– Quem vai arrematar a Sariema? Anda,

Tião! Bota a Sariema no leilão!...

– Bota no leilão! Bota no leilão...

malantaŭ la preĝejo en la vilaĝo Nia Damo La Virgulino de la Doloroj apud Rivereto Muricio.

Procesio envenis, preĝado finiĝis. Kaj la aŭkcio iris rapide kaj estingiĝis, sensprita, ĉar la societano foriris, preskaŭ ĉiuj samtempe.

Sed la aŭkcianto restis en la tendo, manĝante ternuksojn el paperkorneto kaj tusetante pro raŭkiĝo, blokita de popolamaso festofine ebria.

Kaj en la unua vico, premitaj kontraŭ la mallarĝa vendotablo, bone lumigataj de la kandeloj, la du ĉiesulinoj en ĉio trovis enorman spriton, ĉar ili estis la solaj du, kaj pro tio ege serĉataj; ĉiuj deziregis kun ili kuŝi.

Beleco al ili mankis: Anĝelina estis negra kaj iomete lama, kaj nur la alia estis apreŝinda. Sed apude, preskaŭ gluŭta al ĉi tiu alia, kamparano romantikul-vizaĝa, sinĝena kaj ĝenata; ili sin amis kaj tiu diabla aro da viroj havis – almenaŭ por la povra amindumanto – nenium rajton ekzisti. Kaj ĉiumomente la aferoj malpliboniĝis por ili, pro la krioj venintaj el la popolaĉo:

- Kiu proponos por Sariema? Nu, Tiono! Enmetu Sarieman en la aŭkcion!

- Aŭkcian Ŝin! Aŭkcian ŝin...

“Ne bezonante rigardadi, kion diras aŭ faras aliaj, ĉiu povas alporti sian ŝtonon por la kreskanta konstruo. Nenia ŝtono perdiĝos. Nenia laboranto tie ĉi dependas de la alia, ĉiu povas agadi aparte, en sia sfero, laŭ siaj fortoj, kaj ju pli da laborantoj estos, tiom pli rapide estos finita la granda konstruo. Precipe ni turnas nin al diversaj sciencaj societoj kaj kongresoj. Ne rigardante, kion faras aliaj, ne atendente, ke aliaj prenu sur sin la iniciativon, ĉiu societo aŭ kongreso aparte decidu ion tian, kio alproksimigus la grandan komenchoman celon almenaŭ je unu paŝo.” (L.L.Zamenhof, *Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia*, ĉap.VIII)

Respondoj al la kvizo: 1.b ; 2.a ; 3.c ; 4.a ; 5.c.